En Svedio la tradicio pri fastado ege malfortiĝis post la reformacio. Multaj svedoj tute ne scias la diferencon pri *fastlag* kaj fasto. Se oni demandas diversajn svedojn multaj scias ke estas tradicio manĝi bulkon en la antaŭfasto mardo; aliaj asertas ke estas tradicio manĝi ĝin ekde la antaŭfasto mardo kaj dum la fasto, sed jam konscias ke tio estas nelogikaĵo. La erara traduko "fastobulko" devenas de tiu erara opinio pri la deveno de la tradicio de la bulko.

Por trovi bonan vorton por *fastlagsbulle*, ni iom ekzamenis la signifon de "fasto".

Laŭ NPIV "fasti" signifas: "pro religia motivo sin deteni de nutraĵo dum pli-malpli longa tempo" aŭ "ial resti ne manante".

### Medicina kaj dieta fastoj

Eble medicina kaj dietaj fastadoj estas la plej konataj en Svedio nuntempe. Dieta fasto signifas ke oni fastas ĉar oni volas malplipeziĝi aŭ ĉar oni opinias ke oni fartas pli bone se oni fastas dum iu tempo.

Medicina fasto povas ekzemple esti fastado antaŭ operacio aŭ fastado antaŭ kuracista kontrolo.

Pri tio ĉi prefere rakontu aliaj homoj.

### Religiaj fastoj

En la okcidentaj eklezioj – ekz. katolika kaj luteranoj – la reguloj por fastado ne estas tre striktaj. En Sveda eklezio oni ekz. instruas ke dum la fasto – kvardek nedimanĉaj tagoj antaŭ pasko – oni libervolu elektu ion, kion oni promesas ne uzi dum la fasto. Ekzemple mi persone ne manĝas dolĉaĵojn, kaj nenion manĝas inter la ĉefaj manĝoj. Mi nek uzas alkoholaĵojn. Dum la fasto mi

malmulte televidas kaj klopodas ne legi gazeton matenmanĝante, por havi pli da tempo paroli kun miaj familianoj. La trian de Marto mi tamen permesas al mi ĉion ĉi, ĉar mia plej juna filo tiam festas sian naskiĝtagon.

En svedlingva libro "En grönskan-de trädgård" (Artos 2003) mi iom mallongigite citas luteranan priskribon kial estas grave fasti:

1. Jesuo supozas ke ni fastu. Tio estas la plej grava kialo.
  2. Fastante ni ekzercas ni havi la kontrolon pri niaj propraj korpoj. La rezistokapablon, kiun ni tiel ĉi ekzercas, ni povas uzi kiam temas pli pli gravaj principoj.
  3. Fastante ni lernas ke simpla vivomaniero povas esti felia maniero vivi. Ne ĉio tio kio kostas monon, donas feliĉon. La plej bonaj aferoj en la vivo - amo, amikeco, tempo kun aliaj homoj - estas senkostaj.
  4. Fastante ni memorigas nin ke la donajoj de Dio estas bonaj. Mi mem ŝatas bonan manĝaĵojn, ĉokoladon kaj multon alian. Kiam mi fastas mi donas al mi tempon vere sopiri al tio, tiel ke mi des pli multe ĝuos post la fino de fastado.
  5. Fastante ni memorigas nin ke la donajoj de Dio povas difekti ni, se ni uzas ili en tro granda kvanto.
  6. Fastante ni havas eblecon donaci al nia superfluo al homoj, kiuj bezonas ĝin pli bone.
- Kiel menciite, ni luteranoj mem decidis kiel fasti, kion ne manĝi. En aliaj eklezioj, ekzemple en la katolikaj kaj ortodoksaj eklezioj estas pli striktaj reguloj kion kaj kion ne manĝi. Aliaj religioj havas aliajn regulojn pri fastado.

### Ĉu antaŭfasto bulko?

"Fastobulko" do estas tute netaŭga esperanta traduko de la sveda "fastlagsbulle". Pli bona traduko estas "antaŭfasto bulko" aŭ eble eĉ "karnavala bulko", ĉar "karnavalo" estas "antaŭkaresma, dediĉata al amuzajoj". Tio estas en la sveda lingvo: *fastlag*. (Karesmo estas la kristana fastoperiodo antaŭ pasko.)

Mi bonvenigas vian opinion pri kio estas la plej bona sveda vorto por "fastlagsbulle".

Leif Nordenstorm

## La instruo

La sandaloj de la disĉiplo resonadis akre sur la ŝtonaj ŝtupoj kondukantaj al la kelo de la malnova monahxejo.

Li puŝis la pezan lignan pordon, kiu fermis la ĉambron de la maljunulo kaj penis trovi lin tra la densa duon-lumo, la vizaĝo duon-kovrita per kapuĉo, sidanta malantaŭ grandega skribotablo, kie li, spite de la mallumo, notskribis sur granda libro, tiom malnova kiom li.

Kaj la disĉiplo demandis:

- Majstro, kiu estas la signifo de la vivo?

La maljuna monaĥo, restante silenta, nur fingrumis pecon de drapo, ĉifona drapo kiu sidis sur la planko ĉe la muro, kaj tuj poste lia osteca kaj ŝrumpinta montrofingro indikis la fenestrovitron en la supra parto de la ĉambro, polvokovritan post jardekoj kaj plenan je araneaĵoj.

La disĉiplo prenis la drapon kaj suprenirante kelkajn bretojn de peza bretaro ŝargita de libroj li sukcesis atingi la vitron kaj komencis gxin froti energie, forigante la malpurajojn malpermesantajn la travidadon.

La suno plenigis la ĉambron, tremante en sian lumon strangajn objektojn, rarajn instrumentojn kaj dekojn da papiroj kaj pergamenoj kun misteraj enskriboj kaj kabalaj signoj.

La disĉiplo, plenplena je ĝojo, la vizaĝo brilanta pro feliĉo, deklaris:

- Mi komprenis, Majstro. Oni devas forlasi ĉion, kio baras nian vivolernadon; forpreni la polvon de la antaŭjuĝoj kaj la plekton de opinioj kiuj malpermesas ke la konlumo atingu nin, kaj nur tiam ni povos vidi la aferojn pli klare, ekirante tiam rekten al evoluo.

Poste, la juna disĉiplo riverencis, forlasis la domon, nun prilumatan, dezirante dividi kun la aliaj la ĵus ricevitalecionon.

La maljuna monaĥo, la vizaĝo ŝrumpinta kaj ankoraŭ duonkovrita per la granda kapuĉo, la matenaj sunradioj nun banantaj lin per nekutima klareco, vidis la disĉiplon foriranta, kaj lasis eskapi rideton.

- Pli grava ol tio, kion iu montras estas tio, kion la alia vidas... pensis li.

Kaj mallaŭte murmuris:

- Mi nur volis, ke li prenu la drapon kaj metu ĝin en la ĝustan lokon, de kie ĝi falis...

Tradukis: Céllo Martins



## Olle Olsson

Un septembran vesperon en 1963 mi kiel novulo vizitis la bonvenan aranĝon por la novaj studentoj de la universitato de Lund. Ĝi okazis en la granda salono de la domo de Akademiska Föreningen. Je la eniro, anoj de la Studenta Esperantoklubo disdonis presitajn kartojn, kiujn intersitoj plenu kaj sendu al adreso ĉe Bantorget. Mi jam antaŭe lernis iomete da Esperanto, kaj nun vidis eblecon iom pli profunde studi la lingvon. Do, mi ensendis la karton.

Baldaŭ venis invito al informvespero en malpli granda ĉambro de Akademiska Föreningen. Mi iris tien. Ekster la ĉambro renkontis min kvindekkeljara viro kaj demandis ĉu mi intencas iri al la Esperantoinformado. Mi jesis, kaj li afable gvidis min en la ĉambrom.

Tiu viro, kiu ja ne aspektis kiel tipa studento kaj kiu efektive trapasis siajn studentjarojn trideko da jaroj pli frue, tamen montriĝis esti la kasisto de la Studenta Esperantoklubo kaj la posedanto de la adreso en Bantorget, t.e. Olle Olsson. Li en oktobro 2003 forpasis post longa vivo en la servo de siaj idealoj.

Ni estis tri partoprenantoj en la kurso, kiu komenciĝis post la informvespero kaj kiun Olle gvidis. Estus troigo diri ke li estis pedagogo je la fronto de la instruarto. Li sekvis la tradician procedon per legado, tradukado kaj gramatika komento pri la tekstoj de la lernolibro *Allas andra språk*. Sed neniu rapide stariĝis por foriri, kiam la oficiala leciono de la vespero finiĝis, ĉar tiam post kelkaj sondantaj frazoj atendis interesokapta postleciono: Olle libere kaj kun kreskanta entuziasmo rakontis pri travivaĵoj en la Esperantomondo. Tiel ni, sidantaj sur la malmolaj lignaj seĝoj en la ejo de la Esperantoklubo de Lund en Erik Dahlberghsgatan, unuafoje enflaris la etoson de internaciaj kongresoj, aŭdis pri gramatikaj bataloj kaj eksciis pri afablaj klaĉoj, ĉar Olle neniam disvastigis malican klaĉon.

Tiuj, kiuj iam vizitis la modestan subtegmentan loĝejon de Olle ĉe Bantorget scias, ke ĝi ĉiel atestis, ke la enloĝanto estas ĝisostulo por kiu materia komforto neniom gravas sed la ideoj ĉiom gravas. Li havis du malgrandajn ĉambrojn. La unua estis lia laborĉambro, kaj la pli interna estis la dormoĉambro. En la unua ĉambro estis skribotablo, sofo, fotelo kaj pli

simpla seĝo, sur kiu li mem sidis kiam li uzis sian skribmaŝinon aŭ havis gaston. Sur la skribotablo etend-iĝis kelkdecimetra tavolo de diversaj esperantaj - broŝuroj, leteroj, libroj ktp. Nur unu eta spaco estis rezervita por la skribmaŝino, kiu estis ekipita per la specialaj Esperantosignoj. La sofo simile estis plenigita per presaĵoj.

Do, por vizitanto restis la fotelo. Ĝin Olle provis teni libera. Tial sur ĝi estis nur tiom da paperaĵoj, ke Olle povis rapide forpreni ilin, por ke vizitanto povu sidi. Ne estis malordo, nur manko de spaco.

Dum kelka tempo en la 1960-aj jaroj mi estis prezidanto de la Studenta Esperantoklubo de Lund. Kvankam malmultaj personoj aperis ĉe kunvenoj, la listo de membroj estis sufiĉe longa. Tio havis klarigon. Kontraŭe al kasistoj kiuj defraŭdas la kason, Olle pagis la membrototizon por multaj homoj, kiuj iam iel montris etan intereson pri Esperanto. Tiel ili ricevis revuojn kaj diversajn informilojn. Mi ne scias ĉu iu el ili fariĝis aktiva esperantisto, sed certe ili fariĝis homoj kiuj scias ke Esperanto estas viva fenomeno.

La mondo bezonas pli da tiaj homoj kiel Olle.

Bo Sandelin

## Boo Mee Kim-Lindblom



Boo Mee Kim-Lindblom, Haninge, forpasis 62-jaraĝa post mallonga malsano. Ŝi naskiĝis en 1941 en Koreio. Ŝin funebras precipe la edzo Roland Lindblom kaj la filino Giane Rhie kun familio, gefratoj kaj parencoj en Koreio kaj Usono.

La proksimaj kontaktoj kun homoj ĉirkaŭ la terĝlobo, kiuj karakterizis la vivon de Boo Mee, ne ekzistis dum la infanaĝo. Ŝi naskiĝis en korea intelekta kaj tradicia familio, studis la korean lingvon kaj literaturon ĉe universitato kaj komencis labori kiel instruistino en 1962.

Du jarojn poste ŝi ekhavis kontakton kun Esperanto, kaj kunfondis la asocion Stelaro en Söul. En la mezo de la 1960-aj jaroj ŝi instruis Esperanton por infanoj 13-15-jaraĝaj, kaj gvidis kursojn en KAJV (Kristana Asocio de Junaj Viroj kaj Virinoj). Ŝi havis taskon kiel sekretario en la Korea Esperanto-instituto dum la jaroj 1967-1972. Dum la 1970-aj jaroj ŝi plustudis la korean lingvon kaj literaturon, studis pedagogion kaj fariĝis diplomita gimnazia instruistino.

Loĝinte dum kelkaj jaroj en Kanado en la komenciĝo de la 80-aj jaroj, ŝi translokiĝis al Svedio, kie ŝi kompletigis sian edukon kun la sveda lingvo, kontumado, interlingvistiko kaj pedagogio.

La ĝisfundajn sciojn Bo Mee uzis en sia agado en Svedio. Ŝi instruis la korean kiel hejmlingvon, akceptis taskojn de transskribo aŭ analizo de korea teksto, kaj dum la unuaj jaroj estis aktiva en la korea asocio.

Ŝi laboris ankaŭ kiel ordinara instruistino en la fundamenta lernejo kaj gimnazio, kaj kiel instruistino de Esperanto.

Siaj scioj pri origamio, la arto faldi paperojn al belaj figuroj, donis al ŝi diplomon kaj estraran postenon en la Stokholma origamia asocio. Ŝi uzis origamion ankaŭ en sia instruado, kun la deirpunkto ke tiu arto donas ekzercadon de tri gravaj ecoj: koncentrado, preziceco kaj pacienco.

Boo Mee organizis interŝanĝadon kaj vizitojn en Esperanto kun infanaj grupoj en la latva urbo cesis, ĝemelurbo de Tyresö.

Kiel inspiranto kaj administranto Boo Mee agadis en la Esperanto movado. Kune kun sia edzo Roland ŝi prelegis en Esperanto-societoj en Svedio. Ekde 1999 ŝi estis kasistino en la estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Ŝi estis en la komitato de Esperantaj ekzamenoj kaj en Aŭgusto 2003 organizis multajn arangojn antaŭ kaj post la Universala Kongreso en Gotenburgo.

En ĉiu ĉi laboro Boo Mee estis afabla kaj atentema kaj havis proksiman kontaktojn kun parencoj kaj amikoj en ĉiuj kontinentoj. Estas antaŭ ĉio granda homa perdo ke ŝi ne plu ekzistat.

Ulla Luin

## ANONCETOJ

Dezirante kompleti-  
gi nian kolekton de  
la sveda revuo "La  
Espero" ni serĉas la  
jenajn:

- a) jar-kolektojn:  
1913-1919  
b) unuopajn nume-  
rojn:  
1920: 1.2.4  
1921: 2/3.6.11.12.  
1922: 1.3.12.  
1923: 2.3.11.12.  
1924-1925: ĉio.  
1926: 4.6.9.10.  
1927: 3.4.6.7.11.12.  
1928: 1929: 1930:  
ĉio.  
1931: 1.2.  
1932: 1-6.9-12.  
1933: 1.4.5.6.  
1935: 2.  
1938: 2.5.7.11.  
1939: 1-9.  
1940: 1-5.7.8.11.12.  
1941:  
1.3.4.7.8.9.11.

Eble inter la sve-  
daj esperantistoj es-  
tas iuj kiuj povas  
nin helpi - ankaŭ  
unuopaj numeroj  
bon-venas. Volonte  
ni ricevos prez-fer-  
tojn.  
BIBLIOTEKO AR-  
TUR E. ILTIS  
La Saousse  
F-84340 Malaucene  
Francio.

## La plej valora

**Endre Tóth: Lappar, la antikristo.**  
**139 p. Hungara Esperanto-Asocio,**  
**Budapest 1982.**

Iu viro ekiras matene, je bona humo-  
ro kaj en bela vetero, bicikle al la staci-  
domo. Sed survoje io okazas, la  
mondo ŝanĝiĝas aŭ ŝanĝiĝas la viro.  
Li ne plu scias la vojon. "Ĝis nun mi  
neniam kalkulis, kioma flankstrato es-  
tas tiu, sur kiu mi devas pluri por  
atingi la stacidomon, tamen mi atingis  
ĝinĉiam. Diablo scias kiamaniere, ĝis  
nun mi ĉiam sukcesis. Ĉu la formo de  
la domoj orientis min? Kvankam nun,  
kiam mi provas rememori, mi povas  
vekmi eĉ ne unu bildon de la domoj, kiu  
montrus la vojon" (p. 72). Komenciĝas  
bizara serĉado, helpopetado, klopo-  
dado por trovi la perditan  
orientiĝon, sed ĉio vanas. La viro pli  
kaj pli iĝas viktimo de nekomprene-  
bla, absurda, eĉ malamika mondo. La  
sekvo estas drama. Tamen eĉ ĉe la  
fino restas al li ioma fido je la mondo.  
Se li nur havus okazon refoje provi...  
"Nu, jen. Estas ankoraŭ kelkaj tagoj.  
Kaj iam, se mi estos jam hejme, iun bel-  
lan serenatan matenon mi rekomencos.  
Mi ekiros, kaj veturante sur la vojo  
bone konata nepre mi trovos la staci-  
domon" (p. 87).

Verŝajne evidentas al ĉiu leganto,  
ke tiu novelo, *La vojperdinta biciklisto*,  
ne temas nur pri stranga sperto sur-  
voje al stacidomo, sed pli ĝenerale pri  
homaj spertoj de fremdiĝo kaj perdo  
de la orientiĝo en la vivo - fizike aŭ  
spirite. Kutime mi ne emas zorgi tre  
multe pri aŭtora biografio legante be-  
letrajn verkojn. Sed ĉe la ĵus menci-  
ita kaj aliaj noveloj en la novelaro *Lap-  
par, la antikristo* ne eblas forgesi la vi-  
vosorton de ilia verkinto Endre Tóth.  
Dekkvarjara, en 1945, en la lasta tago  
antaŭ batalĉeso, eksplodanta mino  
rabis de li la vidkapablon kaj tiel  
ŝanĝis lin por la vivo - aŭ dumvive  
ŝanĝis por li la mondon.

Ĝenerale en lia sola verko, la nove-  
laro aperinta postmorte en 1982, afe-  
roj okazas sen klara kaŭzo kaj sen evi-  
denta celo. Homoj agas sen videbla  
motivo kaj sen esprimita intenco. Tio  
validas kaj pri la protagonistoj, kaj pri  
la flankaj personoj. Tio kreas por la  
leganto tre apartan perspektivon. Oni  
trovas sin kvazaŭ en tunelo sen kom-  
enco kaj fino, ne sciante de kie kaj  
kien oni survojas. Pro tio aparte elstar-  
as la agoj kaj okazaĵoj *per si mem*. Fo-  
jon post fojo mi ekkonscias, kiom mi  
kutimas ĉion prijuĝi laŭ ties motivoj  
kaj celoj. Ĉe Tóth tio ne eblas. En liaj

noveloj restas kaŝitaj ĉiuj kialoj kaj in-  
tencoj, ĉio aperas nude, objekte.  
Kiel leganto mi kvazaŭ blindiĝas kaj  
devas orienti min palpe, helpe de nek-  
utimaj sensoj. La rezulto ofte estas  
angoriga kaj timiga, kaj mi sentas kaf-  
kecan etoson. Tamen ne temas pri  
neeltenebla inkubo, ĉar mi sentas  
min en bonaj manoj de la aŭtoro. Ja  
okazas fojfoje teruraj aferoj en la  
noveloj de Tóth, tamen mi perceptas  
ĉiaman tonon de indulgo kaj homa  
graco.

La etosoj kaj medioj de la noveloj  
estas sufiĉe variaj, kaj la aŭtoro tre ta-  
lente prezentas ilin per sia konkreta,  
efikeca prozo. Ni flaras la odorojn, ni  
aŭdas la multspecajn sonojn, kaj ni  
vidas la ĉirkaŭaĵon - tamen ŝajnas al  
mi ke regas lumo sufiĉe pala en pre-  
skaŭ ĉiuj liaj noveloj.

En *La ŝtonsegil-maŝino* ni sekvas la  
protagoniston tra ĉiutagaĵoj plenaj de  
ĝenoj kaj turmentoj, dum ie ŝvebas  
tono malclare minaca. Al tio kontri-  
buas lia nokta sonĝo, kiu ne nur  
ripetiĝas, sed krome penetras eĉ en  
lian maldorman vivon. Ja finfine  
ankaŭ okazas io terura en la rakonto,  
sed ni ne scias kial aŭ pro kio.

Sencele mi vagadis sur la stratoj  
senhomaj, sed mi ne laciĝis. Jam  
mateniĝis, kiam mi komencis frosto-  
tremi. En nekonata flankstrato mi  
trovis restoracion. Ĝi estis tipa  
mateniĝa trinkejo; malantaŭ la fene-  
stro, kiel en akvario, foiraj vendistinoj,  
transportistoj, prostituitinoj kaj vaga-  
bondoj fiŝe malfermadis la buŝon,  
ocsedadis kaj ridaĉis neaŭdeble pro la  
dika vitro.

*Mi eniris. Homamaso kirligadis in-  
terne, en sovaĝa zumado. Nur malfacile  
mi trovis sidlokon. Mi gapadis. Mi  
ekvidis homon, portantan pluvmante-  
lon. Kiam mi direktis mian rigardon al  
li, li mallevis la kapon, sed mi estis cer-  
ta, ke ĝis tiu momento li observis min.  
Li ŝajnis al mi konata.* (p. 55)

*Febra sonĝo* tre bone prezentas la  
torditan logikon de vera sonĝo, kaj  
ankaŭ en *Evitu la sunon* la atmosfero  
estas koŝmare paranoja. *Pordoj* havas  
iomete pli komplikan konstruon ol la  
ceteraj noveloj, kun du paralelaj te-  
moj kiuj neeviteble kaj fatale  
renkontiĝas ĉe la fino, tamen ĝi estas  
iom tro mallonga por vere atingi la  
eksciton kaj angoron, kiun ĝi meritus.

En *La tabakvendisto* la loĝantoj de  
iu urbo evakuas ĝin, dum la protago-  
nisto male decidis sola resti, kaj de-  
nove la kaŭzoj kaj eblaj sekvoj restas  
tute ekster la rakonto - ni des pli klare  
perceptas la situacion de la mo-  
mento. Malgraŭ la drameca situacio

eblas senti iel optimisman tonon en ĉi  
rakonto. "Ĉu indas atendi, kio okazos?"  
(p. 70). Tiel ĝi finiĝas. La leganto mem  
devas juĝi.

Plej kaŝeca el la noveloj eble estas  
*Sinjoro Don*, kie la protagonisto en ia  
publika atendejo dum interna penso-  
fluo rigardas la Ĉambron kaj alian  
atendanton. Sed kion li vere atendas?  
Tion ni ne scias, tamen en la lasta li-  
nio de la novelo la aŭtoro proponas  
neatenditan eblan solvon.

En *Groto* ni troviĝas subtere en  
malluma grota koridoro plena de sig-  
noj strange kaj malfacile legeblaj. "Ĉi  
tie, en la interna mondo, la tempo  
pasas tute alie ol en la ekstera mondo"  
(p. 28), diras al la protagonisto iu viro,  
kiu studis la grotajn signojn dum tri-  
dek jaroj. Jes, en nia interna - sub-  
konscia - mondo vere ne nur la tem-  
po alias, sed ankaŭ la logiko kaj la  
ebloj interpreti signojn kaj simbolojn.  
Fine de la novelaro troviĝas kelkaj  
eroj kun pli leĝera, malpli angora  
tono. Temas interalie pri *Aŭtuno*, ra-  
konto pri soleco kaj homa ambicio,  
kun lerta psikologia pritrakto de ho-  
maj rilatoj kaj kondutoj. En ĝi aperas  
tre simbola fervoja semaforo: "La se-  
maforo brilis ruĝe. Kiel malofte, kaj kiel  
mallonge la trapaso estas libera" (p.  
110). *La murdita juglandarbo* estas  
novelo de pli tradicia speco, kun kom-  
enco kaj fino, lerta psikologio, kaj kun  
simpatia moralo. Kaj *Tata Ben* estas  
nigra krimnovelo kun lerte elpensita  
intrigo kaj amara tono. Laste aperas  
eta son-teatraĵo, *Kristnaska saluto*,  
kiu surprizas pro sia humura kaj pre-  
skaŭ farsa dialogo, tamen ankaŭ en ĝi  
amara etoso iom post iom superre-  
gas.

El pluraj tre memorindaj noveloj  
en la kolekto tamen plej elstaras la  
komenca, titola novelo *Lappar, la  
antikristo*. En ĝi ni sekvas la senbri-  
dan, sovaĝan ludon de kelkaj knaboj.  
La atmosfero estas tiu de tempo mili-  
ta aŭ postmilita, kaosa, kie infanoj vi-  
vas sen enmiksiĝo de plenkreskuloj.  
La senprotektita situacio de infanoj en  
ĝi aperas per kruela kaj korŝira klare-  
co. Temas pri manko de protekto kon-  
traŭ la propraj fortoj kaj impulsoj de  
agreso kaj detruemo. Ĉi tiu rakonto  
impresas tre forte, efektive kvazaŭ ia  
arketipa, fabela temo. Kaj la aŭtoro  
atingas tion per ŝajne simplaj rime-  
doj. Denove li prezentas al ni nur nu-  
dajn konkretajn agojn kaj senklari-  
gajn dialogojn. Neniu kialo, neniun  
celo. Nur senmotivaj okazaĵoj kaj ne  
antaŭvideblaj konsekvencoj. Jen tre  
seniluzia kaj senkompata koncepto  
pri la vivo, tamen iel mi ne perceptas

# Neĝofosado

Matene je la sesa mi regardas tra la fenestra vitro. Ho ve! Dum la nokto falis dek kvin centimetroj da neĝo. Je la oka komenciĝos mia laboro. Antaŭ tio mi devas prepari matenmanĝon por la familio; samtempe mia edzino preparas la vintrajn vestaĵojn por la infanoj; mi devas ankaŭ iri kun la malplej granda filo al la infanejo. Jam tio postulas multe da tempo. Hodiaŭ – same kiel dum multaj vintraj tagoj – aldoniĝos ankaŭ neĝofosado.

Se oni loĝas en norda regiono de la mondo oni al kutimiĝas al neĝofosado. En mia urbo Boden, kiu situas en Norda Botnio en Svedio, la unua neĝo kutime falas en la fino de Oktobro. En Decembro ĉiukaze estas tavolo de

neĝo, kiu ne plu degelas. La unuan de Aprilo ĉiujare restas ĉiea neĝa tavolo. La unuan de Majo plej ofte restas nur kelkaj makuloj da neĝo.

Kiam falis neĝo dum la nokto la plej urĝa afero estas forigi la neĝon de la stratoj, por ke la homoj povu veturi al siaj laboroj. Tio estas la tasko de la komunumoj, kiuj havas interkonsenton kun kelkaj kamionentreprenoj. Jam dum la nokto kamionoj kun neĝpluĝiloj komencas forigi la neĝon de sur la stratoj kutime ili devas veturi dufoje sur la sama strato. La rezulto estas ke nun aŭtoj povas libere iri sur la stratoj. Alia rezulto nun estas ke la forigita mola neĝo nun ŝoviĝis

tiel ke ĝi formas malmolajn digojn, preskaŭ remparojn, sur ambaŭ flankoj de la strato.

Mia tasko nun estas forigi la tavolon de mola neĝo, kiu kuŝas antaŭ mia garaĝo, kaj la malmolan digon, kiun kreis la neĝoplugantaj kamionoj. Mi komencas per mia granda neĝoŝovelilo. Kvankam mi ne sopiras al tiu ĉi laboro, mi ne malamas ĝin. Mi bezonas duonhoron por finfari ĉion, ĉar antaŭ mia garaĝo estas sufiĉe granda spaco. Tio donas al mi tempon multe pensi, mediti aŭ preĝi. Samtempe la neĝofosado donas korpan ekzercon. Precipe tion mi ŝatas, ĉar mi estas iom maldiligenta rilate al korpa ekzerco. Neĝofosado estas ŝvitiga laboro.

Kelkaj homoj aĉetis fosmaŝinetojn kiuj fosas la neĝon kaj ĵetas ĝin en direkton, kiun oni povas mem elekti, alĝustigante ĵetilon sur la maŝino. Mi mem ege malŝatas troan uzadon de maŝinoj. Kial unue uzi maŝinon por ŝpari laboron kaj poste ekzerci kurante en la arbaro por havi ekzercon? Tamen por maljunuloj tiaj ĉi maŝinoj donas grandan helpon.

Leif Nordenstorm

## Leteroj el Svedio

### Harold Brown. Leteroj el Svedio.

Pensiuliĝinte, Harold Brown transloĝiĝis de Anglio al Svedio. Li tamen daŭrigis sian kontakton kun la Londona Esperanto-klubo per serio da leteroj por "La Bulteno" de la klubo. Ĝi, festante sian centjariĝon, atenteme eldonis tridekon de la leteroj en 45-paĝa libreto.

Por ĉiuj esperantistoj certe estos interese legi pri okazaĵoj en Svedio, spegulitaj tra la akraj okuloj de anglo. Li sprite kaj klare rakontas pri nektimaj, okulfrapaj legindaĵoj, trovinte ilin en svedaj lokaj kaj landaj ĵurnaloj. La enhavo pri politiko, kulturo, edukado kaj aliaj aferoj estas bonhumora, pripensinda kaj neatendita. Kelkaj el la leteroj temas pri interesajoj dum vojaĝoj en aliaj landoj.

La lingva stilo bonas sed ne komplikas. Tial mi povas rekomendi la libron ankaŭ al relative novaj esperantistoj kaj studrondanoj. Je la fino fakvortoj kaj maloftaj vortoj estas klarigitaj.

La leteraro estas por vi bela kompanio dum vojaĝo, en via preferata fotelo aŭ sur la litotableto.

La libreto aĉeteblas ĉe Esperanto-Asocio de Britio.

Lars Forsman  
Sveda Esperanto-Instituto

En tiu ĉi La Espero ni publikigas recenzojn de du ne tute novaj libroj. Tion ni faros ankaŭ estonte. Recenzoj estos bonvenaj.

La redaktoro

la perspektivon, la rakontan voĉon, kiel kruelan aŭ senkoran. Kial? Eble ĉar la voĉo de Tóth tiel proksimas al la homoj de la rakonto. Kelkaj el la noveloj estas verkitaj en mi-formo, sed ankaŭ ĉe *Lappar* kaj pluraj aliaj, kiuj aperas en tria persono, la rakonta voĉo ne de fore, de supre, rigardas la eventojn, sed kvazaŭ ĉeestas samnivele, je egalaj kondiĉoj. La rakontanto ŝajne ne scias pli multe, nek havas pli da potenco, ol la rolantoj kaj la leganto. Iel la noveloj de Tóth metas nin ĉiujn sur egalan nivelon, dirante al ni: ĉi tiel estas, ĉi tio okazas, egale kial kaj por kio. Ĉi tion signifas esti homo. Ni do estu homoj, laŭ kapablo.

Tri el la noveloj estas premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1974 kaj 1976, kvankam oni mencias nur unu el tiuj premioj en la ne tre zorge farita eldono de HEA (en mia ekzemplero la paĝoj aperas en pelmela misordo, kvazaŭ temus pri ludkartaro).

Dudek jarojn post la apero de ĉi verko, pola mallongdaŭra filmo *La Antikristo* de Adam Gluzi ŝki bazita sur la novelo de Tóth akiris la unuan premion en la 44a Internacia Festivalo de la Dokumentaj kaj Mallongdaŭraj Filmoj en Bilbao. Ankaŭ en la Internacia Festivalo de Juna Kino en Torino ĝi ricevis specialan distingon de la jurio.

Laŭ mia opinio la eta novelaro *Lappar*, la antikristo estas la plej valora verko de la originala Esperanta literaturo.

Sten Johansson

## Kelkaj gravaj datoj en 2004

19-23 Majo

Sveda Esperanto-kongreso kun jar-kunveno de SEF, SEJU, Eldona, sveda ILEI-sekcio.

7-11 Junio

Someraj Esperanto-kursoj en Oskarshamn

28 Junio-3 Julio

Someraj Esperanto-kursoj en Lesjöfors.

Pli da informoj venos en venonta numero de La Espero.

# Esperantos idé

Kan ett språk spridas över världen utan krig och kolonisation?

Ja! Och det har redan hänt. Det internationella språket esperanto har uppnått sin nutida utbredning utslutande genom att enskilda människor blivit inspirerade av dess idé: Att alla människor är jämlikar och därför bör kunna kommunicera som jämlikar. Att kontakt mellan människor från olika kulturer inte ska byggas på den enes dominans och den andres underkastelse.

Att vänskap och fri direktkontakt mellan människor från olika kulturer och världsdelar är en av fredens naturliga beståndsdelar.

Önskar vi fred? Om vi inte önskar krig, så önskar vi fred. Och fred är inte bara en frånvaro av krig, utan en närvaro av samförstånd och sympati mellan människor. Det är bara naturligt att människor som känner så också kan prata med varandra. För detta ändamål skapades esperanto, och det har präglat hela dess historia.

## Esperantos tillkomst

En liten pojke växer upp i 1860-talets ryska imperium (i nutida Polen). Det är en tid som präglas av etniska motsättningar och konflikter, av hat mellan folk med olika traditioner, religioner och språk. Pojken känner en stark längtan efter att kunna göra något för att hjälpa människorna som han ser leva i ömsesidig misstro, en längtan efter att på något sätt bidra till fred och samförstånd i världen. Denna längtan kom att styra hans liv. Hans namn var Ludvik Zamenhof, och hans bidrag skulle bli det internationella språket esperanto.

## Esperantos historia

Många matematiker och en del musiker skapar sina mest genomgripande och nyskapande verk vid unga år, och liksom matematik och musik handlar ju språk om struktur, logik och komposition. Vid 27 års ålder presenterade Zamenhof sitt förslag till internationellt språk, i en liten broschyr, godkänd av tsarens censur sommaren 1887. Sedan dess har språket väckt hela skalan av mänskliga känslor hos dem som mött det: från ren förföljelse under Hitler och Stalin och en allmän misstro som

ofta möter det som avviker från vana och tradition – till den glädje och inspiration som många känner över de möjligheter som esperanto ger. Den sista kategorin utgör idag bara en liten del av världens befolkning, men inte desto mindre är den i stort sett jämnt fördelad över världens länder. Det betyder att esperanto under lång tid haft en alltmer internationell grupp användare, vilken gjort det möjligt för språket att prövas och utvecklas i den mångkulturella miljö det är avsett för. Att esperanto är så pass utbrett över hela jordklotet betyder också att det redan idag erbjuder sina användare ett antal möjligheter till ett rikt internationellt liv.

## Esperanto – möjligheter idag

### A: Esperanto – ett hjälpnät

Det finns i 87 länder esperantister som fungerar som ett slags "hjälpare" eller delegater för dem som vill ha kontakter eller behöver hjälp med olika internationella frågor. Deras adresser finns i det internationella esperanto-förbundets, UEA, årsbok. Man kan t.ex. få information inför en resa, eller hjälp med att undersöka förhållanden i samband med yrke eller hobby. De flesta av de mer än 2000 delegaterna representerar olika fackområden, så att man kan söka fackkunskap och lokalkännedom där den finns.

### B: Esperanto – ett "vandrarhem"

Eftersom många esperantotalande uppskattar att få långväga besök, har det uppstått något som kallas "Pasporta servo".

Det är en bok med cirka 1000 värddar i ett 60-tal länder. Dessa är beredda att ta emot dig som gäst i sitt hem under kortare eller längre tid, oftast gratis. Något för världsresenärer, tågloffare, ja, för envar som vill lära känna andra kulturer och länder inifrån, via de personliga möten som blir möjliga med ett gemensamt språk.

### C: Esperanto – en kulturförmedlare

Böcker: Det finns en rik flora av litteratur på esperanto, och de mest skilda ämnesområden finns representerade. En del verk har esperanto som

originalspråk, men fortfarande är de flesta översättningar. Kring fyrtio tusen titlar har getts ut.

Tidningar: Det finns ett stort antal tidskrifter. Många handlar om språket självt, men det finns också fack- och kulturtidskrifter. Antalet tidskrifter om eller på esperanto i världen är ca 200.

Radio: Ett mindre antal radiostationer sänder esperantospråkiga program på kortvåg och vissa även per satellit. Peking och Warszawa sänder dagligen, Wien, Rom och Havanna en gång i veckan.

TV: Underlaget är ännu för litet för något motsvarande CNN (den amerikanska nyhetskanalen med nyheter från hela världen) på esperanto, vilket annars vore en fullständigt naturlig sak.

Brev: Allt som behövs är penna, papper, frimärke och ett fungerande postverk. Adresser finns i många av esperantotidskrifterna, eller kan förmedlas genom brevvänsförmedlingen "Koresponda servo mondskala". Det kan vara mycket stimulerande att på ett förtroligt plan ha kontakt med brevvänner från fjärran länder.

### D: Esperanto – en väg till kollegor

För ett antal yrkes- och hobbyområden finns särskilda organisationer av esperantotalande. De kan ge möjlighet till samarbete och affärskontakter, eller studieresor, i din bransch, i språkområden som annars skulle varit otillgängliga.

### E: Esperanto – evenemang

Varje år arrangeras runt om i världen en lång rad kongresser, seminarier och olika internationella evenemang. Här möts människor från olika delar av världen. Den mest kända är världskongressen med några tusen deltagare från ett 60-tal länder.

Under en vecka bjuds på kurser, konferenser, diskussioner, sång, musik, teater, utflykter, föreläsningar och informellt umgänge. Naturligtvis helt tolkfritt.